



Oficiala Organo  
de \_\_\_\_\_

Flandra \_\_\_\_\_

Ligo \_\_\_\_\_

Esperantista \_\_\_\_\_



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag  
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproportcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

## EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50	broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset		7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,—	»
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl		3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek		22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)		10,—	»
Flageto por biciklo		6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,—	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2.50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2.50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4.50 fr.

**Glumarkoj**, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

**Glumarkoj** « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj po 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: po 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate



Redakcia-  
adreso:  
Houwerstraat, 22  
Antwerpen.  
Tel. : 277.51.



Administranto :  
Gerard Debrouwere  
Magdalenastr. 29  
Kortrijk  
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga  
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.  
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-  
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,  
A. LODEMA kaj aliaj.

## La 27a Universala Kongreso de Esperanto en Italujo

Rulkongreso, migranta kongreso, vojaĝanta kongreso, krozadanta kongreso, amuza kongreso.

Jen, karaj flandraj nekongresintoj, la diversaj kromnomoj, kiujn ni aŭdis kaj legis. Sed nenie ni aŭdis aŭ legis pri serioze laboranta kongreso !

Vere, krom la malferma kaj ferma kunsidoj, la fakaj kunsidoj kaj tiuj de la somera Universitato, nur unu laborkunsido okazis... ĝi estis nemultnombro vizitata...

« 1500 Esperantistoj el 35 landoj en la Eterna Urbo » ni legas en Heroldo. Sed ankaŭ ni legas, ke tre multaj neesperantistoj kaptis la okazon fari belan ekskurson malmultekostan tra Italujo, aliĝintaj al la Kongreso. Estis 10 ĝis 20 % da tiaj.

La plej granda parto, ankaŭ de la jesesperantistoj venis tien por kiel eble plej multe vidi kaj ĝui dum la kongressemajno. Nu, la restado tie estis plenĝoje ; la hoteloj tre bonaj, la manĝaĵoj bon-gustaj kaj la aĉetaĵoj malkare pageblaj.

La organizo de la kongreso ne estis plene laŭdinda. La, laŭ la programo fiksitaĵoj horoj, multfoje ŝanĝiĝis lastmomente, tiel ke pluraĵoj kunvenoj ne povis esti ĉeestataj pro malfruigo de la kongresantoj. Mardon, la 6an de aŭgusto okazis la malferma kunsido en la granda amfiteatro de la koncerta domo « Aŭgustejo » en Romo, akurate je la 11a horo. Lia Ekscelenco Vicministro Dumidei, en la nomo de la Reĝo de Italujo kaj de la Duce, Mussolini, solene malfermis la kongreson.

Lian mallongan paroladon tradukis S.ro Prof. Bruno Migliorini. S.ro Malmgren, la prezidanto de la pasintjara universala kongreso en Stockholm proponis la estraron por la nuna kongreso, kiu kiel kutime, estis akceptata. La prezidanto de la kongreso, S.ro Stefano

La Colla nun faris la salutparoladon, en kiu li speciale salutis la membrojn de la Familio Zamenhof kaj la italajn aŭtoritatulojn.

Poste parolis la prezidanto de U. E. A., S.ro Generalo Bastien. Dirinte kelkajn afablajn vortojn al S.ro S. La Colla, li rememorigis la kongresanojn al la mortinta s.ro Behrent, eksprezidanto de Germana Esperanto Asocio kaj prezidinto de la jubilea kongreso en Kolonjo. Li ekvekis la Esperantistaron al unueco, toleremo, amo kaj disciplino.

Nun sekvis la alparoloj de la diplomataj reprezentantoj kaj de la reprezentantoj de la naciaj Esperantistaj Societoj. La kongreso ankaŭ estis salutata de la filo de Adamo Zamenhof, nome de la familio de la Majstro. Post kanto de « La Espero » la malferma kunsido finiĝis je 12.30 h.

En la « Heroldo » de 25 aŭg.-4 sept. ĝia redaktoro rakontas siajn travivaĵojn kaj impresojn dum la kongreso. Kaj kian impreson ni nun havas, post la legado de la raporto de S.ro Jung ? Ke la kongreso... ne estis kongreso. Ĝi estis granda turista ekskurso tra Italujo kaj ŝipveturado al Afriko.

La L. K. K. konsistis el bonvolemaj samideanoj, sed ili estis tro malmultnombraj por tia ampleksa laboro, kiu devis esti farata en diversaj urboj.

Tiuj, kiuj iam aranĝis landan aŭ regionan kongreson, spertis kiom da laboro kaj antaŭpreparo ĝi postulas. Internacia kongreso ankaŭ bezonas multajn eminentajn komitatanojn kaj dekojn da helpantojn. Kaj tie en Italujo la L. K. K. estis nur tre malgranda, kvankam ĝi devis antaŭprepari kongreson, ne nur en Romo, sed en tuta Italujo ! Jen la kaŭzoj de la multaj ŝanĝoj ; jen la kaŭzo ke dum la ekskursoj al Pompeji kaj Capri mankis esperantistaj gvidantoj. Nun la ekskursantoj estis devigaĵaj aŭskulti la klarigojn de la gvidantoj de ne esperantistaj turistoj.

Trafe S.ro Jung atentigas pri la fakto ke grandaj grupoj de samnaciaj restis inter si, (eble pro la multaj neesperantistaj amikoj, kiuj partoprenis ?) kaj plejparte parolis sian nacian lingvon anstataŭ Esperanton. Dum la ferma kunsido S.ro Bastien aludis pri tio. La ununura laborkunsido de U. E. A. okazis merkredon la 7an de aŭgusto je la 9.30 h. en la Universitato. Ĝi estis malbone vizitata kaj la paroladoj kaj traktadoj estis malfacile kompreneblaj pro troa ekstera bruoj. Pri la nuna stato de la mondorganizo oni ne multe sciigis. La ĉefan parton de la kunveno oni diskutis pri la akcepto aŭ neakcepto en U. E. A. kiel dua landa organizo de « Tutnederlanda Esperanto Ligo ».

La diskuton partoprenis gesamideanoj Telling, Bastien, Petit, Baas, Isbrücker, Asai, Goldsmith, kaj aliaj. Iu franca samideano opiniis ke oni devas modifi la statutojn. La prezidanto konsentis ke la statutoj ne estas perfektaj sed oni ne povas ĉiujare ilin ŝanĝi !

Kvankam U. E. A. do bezonas monon kaj ankaŭ kunlaboron, oni tamen ne akceptas T. E. L. Ni preskaŭ certe kredas, ke dum tiu kunveno ankaŭ estis parolata pri Flandra Ligo, ĉar en la raporto ni trovis kelkajn spurojn pri tio, legante « inter la linioj ».

Ĉu ni devas konkludi ke U. E. A. prefere lasas la « ĉaron en la marĉo » ol... ŝanĝi la statutojn ? Fl. Ligo atendis 6 jarojn kaj ĝi povas ankoraŭ atendi ! Ĝia tempo certe venos !

La ferma kunsido okazis sabaton la 10an de aŭgusto posttagmeze en Napolo. S.ro Bastien dankis la aŭtoritatulojn italajn kaj la membrojn de la kongres-komitato. Inter alie li diris :

« Permesu aldoni ankoraŭ unu rimarkon : Nia Universala Kongreso estas kongreso de esperantistoj el ĉiuj landoj, kiuj kunvenas por fari la esperantistan popolon. Okazas, ke multaj grupiĝas samlandane, parolante la gepatran lingvon. Mi petas vin lerni Esperanton sufiĉe bone, por ke en niaj kongresoj sonu la lingvo de Esperantujo : **ESPERANTO.** »

Nur 3 Universalajn kongresojn ni ĉeestis : En Antverpeno, Parizo kaj Kolonjo. Sed preskaŭ tute ne ni konstatis ke du aŭ pli stelportantoj, parolante inter si, parolis alian lingvon ol Esperanto.

La malferma kunsido finiĝis. Oni kantis la himnon. Oni kantis ĝin false pro manko de akompananta muziko ! Jen la fino de la oficiala parto de la kongreso.

Kaj nun komenciĝis la krozado. La krozado, pri kiu oni la tutan jaron jam parolis, por kiu Heroldo, Esperanto kaj aliaj Esp. gazetoj tutan jaron propagandis.

La itala ŝipo « Leonardo da Vinci », luita de la L. K. K. jam delonge estis rekvizita de la Duce por militaj celoj ; pro tio, per la helpo de S.ro Bastien, oni povis lui la ŝipon francan « SINAIA ».

Ni citas el Heroldo, kiel S.ro Jung jam antaŭĝuas la vivon dum unu semajno sur la « Sinàia » :

« Gojo kaj fiero plenigas niajn korojn. Jen la ŝipego, kiun ni suriros en la hodiaŭa vespero ! Jen nia vera esperantista hejmo por unu tuta belega krozada semajno ! Baldaŭ la ĉaso de unu al alia loko finiĝos, por tuta semajno ni ne bezonos ŝanĝi la hotelon, nek zorgi plu pri la valizoj. La kajutoj estos nevastaj, kompreneble!, sed tamen sufiĉe komfortaj, kiel indikis la antaŭanonco, kiel informis la LKK kaj Heroldo. La ŝipo veturos « plene sub Esperantoflago », ni — la verdaj pasaĝeroj — rajtos uzi tutan ĝian lokon en ĉiuj ĝiaj ejoj kaj ferdekoj. ni ĝuos la agrablan bloveton dum la veturado, la varmeĝo ne plu tiom premos kiom dum la kongresaj tagoj inter la ŝtonamasoj de la grandurboj, ni ĝuos la freŝigan restadon en la naĝbaseno. Dum horoj ni ripozos sur komfortaj kuŝseĝegoj, rigardante la bluan maron kaj la bluan ĉielon. Ni havos la plej bonajn manĝojn imageblajn : ja la franca kuirarto estas konata, jam ofte ni havis okazon sperti kaj laŭdi ĝin, kaj oni scias, ke la manĝaĵoj sur la grandaj oceanŝipoj estas speciale bonaj. Kaj vespere ni aŭskultos la ravajn melodiojn de la certe ne granda, sed tiom pli intima ŝiporkestro, aŭ ni dancos laŭ ĝiaj taktoj en la sude abunda « vintroĝardeno ». sur bonega pargeto kaj ĉe magia lumo de lampionoj pendantaj inter la verdajoj. Ni facile trovos niajn kajutojn, ĉiujn salonojn, ŝiujn ŝtuparojn kaj ferdekojn. ĉiujn eĉ malgrandajn sed necesajn ejojn, ĉar kompreneble ili ĉiuj surhavas surskribojn en nia kara lingvo Esperanto, same kiel la menukartoj, la vinkartoj ktp. senesepte estos presitaj aŭ skribitaj en Esperanto. Eble eĉ la kelneroj kaj geservistoj de la ŝipo partoprenis rapidkurson Esperantan kaj scipovos, almenaŭ iom, interkomprenigi sin kun ni en nia verda lingvo. La ŝipego « Sinaia » estos por unu semajno

« nia vera regno Esperantujo », « nia Verda Insulo de l' Feliĉuloj », kiel promesis al ni la semajna ĵurnalo de la Esperanto-movado en sia blua numero kun la kliŝo de l' ŝipego sur la titola paĝo. « Mirakla ŝipo ĝi estos », skribis Heroldo de Esperanto en la sama blua numero, kiu tiel alloge simbolis al ni la bluegan bluecon de la italaj ĉielo kaj maro.

» Jes, niaj verdaj esperantistaj koroj ŝvelas. Jen ĝi naĝas : la impona markoloso sub la Esperanta flago. Hodiaŭ vespere ĝi fariĝos nia hejmo. Hodiaŭ vespere... »

La bela sonĝo de S.ro Jung realiĝis jene. Por la 700 vojaĝantoj nur du manĝocambroj disponiĝis ; unu luksa sed malgranda, kaj unu granda sed varmega kiel infero. Oni manĝis je tri ĝis kvin partioj, unu grupo post la alia. La personaro de la ŝipo estis tro multnombra. La krozadanoj koleris, la personaro grumblis. Mankas preskaŭ ĉia komforto. Por la plej granda dunuo ne estis ferdekseĝoj, nemankipovaj objektoj sur ĉiu oceanŝipo ! Ŝiporkestro, vintroĝardeno, naĝbaseno, ĉio mankis, necesejoj estis malpuraj, kajutoj ne purigataj, la litoj oni devis ordigi mem ĉiutage, la personaro minacis striki. La manĝoj kvankam ĝenerale kontentigaj ne estis sufiĉe variaj.

En multaj kajutoj mankis akvo. La kranoj estis detruitaj aŭ deŝraŭbitaj. Estis malorda ŝipmastrumado ! Kompreneble la humoroj kaj la vizaĝoj de la krozadantoj klare montris la malbonimpreson... Se ni konsideras, ke S.ro Jung kaj edzino disponis pri sufiĉe vastan kajuton (pro kio li speciale dankis la L. K. K.) ni povas facile kompreni, ke tio kion li spertis dum la vojaĝo rilate la vivon sur la ŝipo ne estas troigita. Oni moknomis la ŝipon « Arabkesto ».

La trian tagon de la vojaĝo S.ro Petit, la franca karavanestro sukcesis almenaŭ iom ordigi la uzadon de la manĝocambroj kaj de la ferdekseĝoj, tiel ke ĉiu laŭvice povis ĝui, de la granda aŭ malgranda salonoj kaj de la seĝoj.

Ankoraŭ aliaj mankoj kaj plendoj ni legis, sed sufiĉas !

La urboj kiujn oni vizitis estis grandiozaj kaj pri la ekskursoj oni estis kontentaj. Feliĉe iom da rekompenco ! La ĉiam optimisma S.ro Jung skribas :

« Malgraŭ tio, ĝi (la vojaĝo) estis sukceso. Ĝi pruvis ke la Esp. movado jam estas kapabla entrepreni sufiĉe atentindajn aferojn ». Kaj plie : « la italaj samideanoj faris superhomajn streĉojn por atingi tiun sukceson, kaj ili meritas grandan dankon ».

En alia artikolo ni jam legas « La demando, ĉu ni iam ripetu ĝin (la ŝipvojaĝon) estas jam superflua ».

Kaj li konkludas ke ni restu ĉe nia bona malnova kutimo : havi la tutan kongreson dum plena semajno en unu sama urbo ; se eble eĉ en unu sama taŭga salonegato.

Tamen, li opinias ke estas ebla arangi kongresan krozadon. Tiam la ŝipo estu la kongresloko ; oni kongresas surŝipe kaj vizitas diversajn havenojn por amuzo kaj propagando. Sed, tiam oni devas zorgi por pli taŭga ŝipo, kio estas certe ebla.

Karaj nekongresintoj, ni finos. Certe la raporto estas tute ne kompleta, sed ni esperas ke vi povas formi al vi ideon pri la valoro de la 27a. por la Esp. movado !

A. L.

# Leteroj el Esperantujo

## XI.

AMIKO LA KOKO,

Unu centrimetron de mia plumingo mi jam formaĉis kaj neniu vorto jam surpaperiĝis. Senkuraĝige mi volis prokrasti mian leteron al vi, kiam mi ricevis la « Haagsche Post », fame konatan semajnan gazeton, multŝatata ĉie en la mondo, kie troviĝas Nederlandlingvanoj. Neniam, laŭ mia scio, ĝi skribis pri, pro, por aŭ kontraŭ Esp. Ĉu eble pro tio, kvazaŭ magnete miaj okuloj estis altirataj de la duondecimetron altaj literoj de la titolo? Efektive la literoj C. H. de « Haagsche Post » estis kovritaj per... kvinpinta stelo! Kaj en tiu stelo mi legis en Nederlanda lingvo: Andreo Cseh, la konata Esp. instruisto malfermas en ĉi-tiu numero propran rubrikon. — Grava venko! Grava antaŭenpuŝo de la Esp. ideo en Nederlando!... susuris en mia kapo.

Tuj mi trafolumis la 32 grandpaĝan gazeton kaj trovis artikolon de neniu malpli ol la urbestro de Hago, la kortega urbo de Nederlando. En la nederlandlingva artikolo, la urbestro, S.ro S. J. R. de Monchy, propagandas Esperanton, la lingvon de la estonteco; li laŭdas la redakcion, kiu malfermas siajn kolonojn por la propagando de Esp. Sur paĝo 10 mi trovis la artikolon de Andreo Cseh, sub la titolo « Esperanto Rubriek ». Li certe pardonos min, ke mi por vi kaj la viaj enmetas lian artikolon:

« Kiam mi ricevis de la redakcio de « Haagsche Post » la honorigan inviton skribi artikolojn en Esperanto por ĉi tiu admirata kaj ŝatata gazeto, du profundaj impresoj tuŝis mian animon.

La unuan impreson faris al mi la eleganta gesto de la redakcio, kiu permesas al mi uzi mian lingvon kaj ne devigas min ellerni kaj uzi la nederlandan lingvon. En la nuna epoko, kiam la ideo de perforto kaj de senlima nacia egoismo en pluraj landoj fariĝas nova evangelio, ĉi tiu dokumento de la nederlanda liberaleco aperas kiel ĝojiga signo de kultura progreso kaj de plivastiganta humaneco.

Sed la fakto, ke sur la paĝoj de « Haagsche Post » aperas artikolo en la lingvo Esperanto, montras ankaŭ la supozon de la redakcio, ke inter la legantoj jam troviĝas multaj personoj, kiuj komprenas Esperanton, kaj ke la ceteraj legantoj povos facile « deĉifri » la liniojn de la Esperanto-rubriko, se ilin spronas la scivolo aŭ la pasio venki lingvajn barojn. Mi tute ne dubas pri la praveco de tiu supozo, ĉar rilate al la nombro de Esperantistoj nepre Nederlanda tenas nuntempe la unuan lokon, kaj ĉar la intereso kaj talento de la nederlanda publiko en la lingvolernado estas ja tutmonde konata.

La duan impreson faris al mi la fakto, ke la sola fremdlingvo, al kiu la « Haagsche Post » malfermas siajn kolonojn, estas la lingvo Esperanto. Kaj ĉi tiu impresado vekis en mi rememorojn.

Dum mia agado kiel disvastiganto de Esperanto mi estis ofte objekto de intervjuoj, en diversaj landoj. Mi devas konfesi, ke tiuj intervjuoj metis min ne unufoje en strangan situacion. Inter la diversaj demandoj de la sensaciemaj ĵurnalistoj preskaŭ ĉiam aperis ankaŭ la jena demando:

— Kiam venkos Esperanto ?

Bedaŭrinde mi devis seniluziigi la demandintojn per la respondo :

— Sinjoro, ĉu vi faras intervjuon aŭ spiritistan seancon ? Mi ne estas mediuo, nek klarvidanto, nek profeto.

Sed laŭ la konata leĝo de la psikologio, tiu ripetata demando iom post iom edukis en mi la profeton, ĝis kiam unufoje mi riskis jene respondi je la demando, kiam venkos Esperanto :

— Tiam, kiam en via ĵurnalo unu paĝo aperos en Esperanto !

La ĵurnaliston ne surprizis mia respondo. Li kaptis mian deklaron kaj sen hezito aldonis :

— Kaj post kiom da jaroj okazos tio ?

En tiu momento mi rimarkis, ke la profeto venkis en mi la honestan homon, la modestan nescianton. Same kiel ĉe Molière la bastonbatoj faris el la servisto kuraciston, el mi la flataj intervjuoj faris suverenan klarvidanton. Por ne perdi la senpene akiritan nimbon, mi respondis kun grava mieno :

— Sinjoro, tion mi scias, sed hodiaŭ ĝi estas sekreto.

Tion dirinte mi prenis paperpecon, faris sur ĝi noton per mia fontplumo, enmetis la paperon en la koverton, fermis la koverton kaj transdonis ĝin al la ĵurnalisto kun la vortoj :

— Sinjoro, en la koverto sur la paperpeco estas notita la jaro, en kiu Esperanto venkos. Sed vi rajtas malfermi la koverton nur post la venko de Esperanto.

Ci tiu epizodo okazis antaŭ pluraj jaroj, mi ne scias precize, kie. Se mia memoro ne trompas, en iu angla aŭ dana urbo. Mi estas scivola, ĉu la ĵurnalisto iam malfermos la koverton kaj publikigos ĝian enhavon, aŭ eble li perdis la paciencon kaj jam forĵetis la koverton, kiel sensencaĵon. Ankaŭ tion mi forgesis, kiun jaron mi notis sur la kaŝita papereto. Ĝi perdis por mi la gravecon, ĉar intertempe la spertoj, per kiuj regalis min la homaro kaj la Esperantomovado, devigis min revizii kelkajn el miaj « antaŭvidoĵ ».

Sed nun, kiam la « Haagsche Post » decidis presi rubrikon en Esperanto, revekiĝis en mi la memoro, ekbatis mia koro kaj mia buŝo malfermiĝis por la vortoj :

— Jen la signo de la venko !

Efektive, ni devas konstati, ke Esperanto post la periodo de la necesa elprovado alvenis al la etapo, ĉe kiu la granda publiko, ankaŭ la skeptika kaj indiferenta, ne revanta, sed praktikajn utilojn serĉanta publiko, devas ĝin konsideri kiel faktoron en la reala vivo.

Kara legant(in)o, en ĉi tiu rubriko mi vizitos vin ĉiusemajne, por diri kelkajn aktualajn frazojn pri la venkanta mondlingvo. »

Vi ne povas imagi mian ĝojon leginte en H. P. Esp. artikolon de tia eminentulo kaj ĉiusemajne la H. P. legantoj, trovos Esp. kolonon ! Kaj tio ne estas ĉio ! Ĉiu abonanto de H. P. ricevos post peto, de la redakcio senpage Esp. ŝlosilon. Plie la redakcio demandas « Kiu scias imponan titolon por tiu-ĉi ĉiusemajna Esp. kolono, ĉu nederlandan, ĉu Esperantan ? La ensendanto de la plej bona ideo gajnos 25 guldenojn.



Nu, amiko, tiujn 25 pupojn (1) mi volas gajni. Jen kiamaniere : La legantoj de H. P. posedas la rajton proponi ĉiusemajne unu personon, kiu faris ion noblan, ion heroan, aŭ ion por la ĝenerala bonfarto de la homaro, al la redakcio. Se la redakcio konsentos la meritojn de la proponita persono, ĝi sendas al li, aŭ ŝi... torton kun honorada dokumento, kiel premion. Nun la afero estas tre simpla. Mi proponas ke la redakcio de H. P. sendu la torton al la... Redakcio de H. P. kiel premion por ĝia propagando de nia lingvo. Samtempe mi sendas la trovitan de mi imponan titolon por la Esp. rubriko kaj invitas la redakcion sendi la 25 pupojn al mi. Simple kiel bonan matenon, ĉu ne ?

Kiel ĉiam,

R. LA VULPO.

(1) « Pupo » = pop: nomo, kiun oni en Nederlando en la ĉiutaga vivo donas al guldeno, same kiel la flandroj nomas frankon « baard » (barbo).

## Voor het graf van Juul Karnas

Met groote erkentelijkheid publiceert het Komiteit de volgende ontvangen gelden. Indien er namen ontbreken of verkeerde bedragen worden vermeld, verzoeken wij de betrokkenen, het Komiteit hiermede in kennis te stellen.

M. de Haaf N. 5,— fr.; Mej. Geers B. 10,— fr.; Mej. Heyens H. 10,— fr.; Mej. Joukes L. 30,— fr.; M. Lamoen J. 5,— fr.; Mej. Declercq 5,— fr.; M. Lodema A. 25,— fr.; Mevr. Lodema A. 15,— fr.; M. Lodema A. (zoon) 10,— fr.; Mevr. Matteus J. 10,— fr.; M. Meire A. 20,— fr.; M. Monstrey J. 5,— fr.; Mevr. Simons 20,— fr.; M. Van As J. 20,— fr.; Mej. Van der Mast M. 10,— fr.; Mej. Van Ganse A. 10,— fr.; Mej. Van Ganse I. 10,— fr.; Mevr. Van Peel J. 5,— fr.; M. Van Peel P. 20,— fr.; M. Verheyden E. 5,— fr.; M. Verhoeven J. 3,— fr.; M. Volders F. 20,— fr.; Café « *De Leeuw* » 5,— fr., te ANTWERPEN.

Mej. Mertens R. en J. 10,— fr.; M. Schroeyers C. 20,— fr.; M. Timmermans J. 5,— fr.; M. Torremans R. 10,— fr., te BERCHEM-ANTWERPEN.

M. De Gruyter D. 5,— fr.; Mej. Leys S. 20,— fr.; M. Vandersteen J. 5,— fr.; M. Vanstertegem E. 5,— fr., te BORGERHOUT-ANTWERPEN.

M. Bouw Fr. 10,— fr.; M. Calloens L. 25,— fr.; M. De Bondt R. 5,— fr.; Mej. De Cock P. 10,— fr.; M. De Kegel R. 10,— fr. M. D'Hondt H. 5,— fr.; M. Eekhoudt R. 5,— fr.; Mej. Geeroms E. 5,— fr.; M. Neirinckx E. 5,— fr.; M. Schoupe E. 5,— fr.; Mej. Van Mulders M. 10,— fr.; Mej. Vereecken R. 5,— fr., te AALST.

M. Van Winckel J. 20,— fr., te AARSCHOT.

« Katolika Junulara Esperanto Grupo » 14,— fr., te BRUGGE.

« N.E.L.E. » (Monkolekto dum la jarkunveno) 51,— fr.; Sennoma 2,— fr.; Sennoma 4,— fr., te BRUSSEL.

M. Genar 20,— fr., te DEURNE.

« Nio Idealo » 25,— fr., te EDEGEM.

Mej. Terryn J. 20,— fr., te GENT.

M. Lenaers G. 3,— fr., te HAMME.

- M. Doornaert A. 5,— fr., te HARELBEKE.  
 Mej. Keveryn L. 10,— fr., te HEMIXEM.  
 M. Boyens E. 5,— fr., te HOBOKEN.  
 Esperanto Grupo 50,— fr., te KORTRYK.  
 M. Dekesel M. 20,— fr., te LEUVEN.  
 M. De Rybel 5,— fr.; M. De Winter 5,— fr.; M. Rainson H. 5,— fr.; Van de Poel P. 5,— fr.; Mej. Van de Werf M. 5,— fr., te MECHELEN.  
 La Estonto estas Nia (monkolekto dum kunveno) 9,— fr.; M. Ryssens 1,— fr.; M. Blommaert 0,50 fr.; M. Buys 1,— fr.; M. Cautreels 1,— fr.; M. Daniël 1,— fr.; M. De Beukelaer 0,50 fr.; M. De Ceuster 1,— fr.; M. Dermier 0,50 fr.; M. Embrechts 0,50 fr.; M. Flierackers 1,— fr.; M. Henkens A. 2,— fr.; M. Horemans 0,50 fr.; M. Jacobs 0,50 fr.; M. Jordaens 1,— fr. M. Linfoer 1,— fr.; M. Martens J. 2,— fr.; M. Melius 1,— fr.; M. Pollegoms J. 2,— fr., M. Roes 5,— fr.; M. Schevelenbosch 1,— fr.; M. Springael 1,— fr.; M. Van Look 0,50 fr.; M. Van Trier 0,50 fr.; M. Voorbroeck J. 1,— fr., M. Willemssen 0,50 fr.; M. Wuyts J. 1,— fr., te MERXEM.  
 « Katolika Rondo Esperantista » 20,— fr.; M. Engel M. 5,— fr.; M. Lenaerts 5,— fr.; M. Lernout J. 20,— fr.; M. Sieghers E. 20,— fr.; Mej. Van Durme C. 10,— fr.; M. Van Durme H. 25,— fr.; Mej. Vangenechten C. 5,— fr., te MORTSEL.  
 « Oostenda Grupo Esperantista » 20,— fr., te OOSTENDE.  
 « La Paca Stelo » 50,— fr.; M. Cantaert J. 5,— fr.; M. De Boës G. 25,— fr.; M. De Ruyver P. 5,— fr.; Mej. Geenens J. 5,— fr.; M. Geenens M. 5,— fr.; M. Ockerman G. 5,— fr.; Samideano el Ronse 5,— fr.; M. Seynaeve M. 5,— fr.; M. Spiers M. 5,— fr.; M. Van der Coilden Z. 5,— fr.; M. Vergeyust M. 5,— fr., te RONSE.  
 « Ruselara Esperantista Grupo » 29,— fr., te ROESELAERE.  
 M. Libot F. 20,— fr., te STABROECK.  
 Mevr. Robert D. 30,— fr., te UKKEL.  
 Verkoop 108 kantaroj Esperantistaj 439,30 fr.  
 M. Boone 20,— fr., te OUDENAERDE.  
 Mev. Karnas-Verhoeven 489,70 fr., te ANTWERPEN.  
 Totaal : 2.052,50 fr. *De Schatbewaarder* : H. VAN DER MAST.

## **Kanto de l' Flandra Ligo Esperantista**

*Teksto de Pol Varens*

- 1 Sur nigra nokta firmament'  
 De l' militema mondo  
 Leviĝis stel' en orient  
 Ĉe nova horizonto.  
 Kaj pioniroj por la pac'  
 Nun ĉie montris sin.  
 La monda lingvo, Didonac'  
 Per am' kunigas nin.

*Refreno :*

Sub verda stel' fratigas ni  
 En lig' de Flandroland'  
 Seninterrompe luktas ĝi  
 Por lingvo Esperant'

- 2 En nia kara Flandroland'  
Ni vidis tiun stelon ;  
Gvidante nin al Esperant'  
Montrante novan celon...  
De l' popol' nia la kultur'  
En mond' disigas sin ;  
Malantaŭ disfalanta mur'  
La mond' aperas nin !

## KANTO DE L' FLANDREMA

*Teksto: J. Genar.*

- 1 Jen ! la kanto de l' Flandrema  
Esperanto Grupanoj  
Loĝas ni en Antverpeno  
Estas Skeldo — amikar'.

*Rekantajo*

- Vivu nia idealo,  
Ĝin defendu ĝis la falo,  
Kaj, aŭdigu ni la kri'  
La « Flandrema » estas ni.
- 2 Luktu ni por la movado  
Flandremuloj, ĉiuj ni  
Venkos ni, la kontraŭulojn  
Perfidantojn de l' naci'.
- 3 Apud ni, en la batalo  
Firme, staras la knabin',  
En l'afero al ni sankta  
Ŝi elkore helpas nin.
- 4 Propagandu ni, senlace,  
Per parolo aŭ per kant',  
Por la pac' kaj Esperanto,  
Kaj libera Flandroland'.

## HO, VI, BONEDUKATULO ...

1  
Ho, Vi, Bonedukatulo,  
Eĉ plej ŝerca petolulo,  
Eble jam dum karnavalo  
Forirante post la balo,  
Vi promenis en ĉemizo,  
Almontrante ke la krizo  
De la ŝtofo ne ekzistas...  
Tamen kvankam vi insistas  
Pri la bon' de via temo,  
Pri la bel' de la senĝeno,  
Pri la rajtoj de nudisto,  
Eĉ ne unu policisto  
Vin permesos malgraŭ krizo  
Promenadi sen ĉemizo.

2  
Ho, Vi, Bonedukatulo,  
Eĉ plej ŝerca petolulo,  
Eble estas vi gastema ;  
Kiu taksas tre poema  
Vizitadi amikinojn,  
(De l' beleco sinonimojn)  
Tra la pord' largmalfermita.  
Sed ne estas permesita  
Dum la nokto sur tegmento  
Amindum' kun elokvento,  
Ĉar la monda kodo diras :  
Unufoje jare iras  
Tra la tru' de kamentubo  
Sankta Nikola' kun ĥubo !

Ho, Vi, Bonedukatulo,  
 Eĉ plej ŝerca petolulo,  
 Eble ŝatas vi muzikon,  
 Kanton, dancon kaj lirikon.  
 Kaj vi ĝojas optimiste  
 Cie, ĉiam kaj persiste  
 Eĉ se eta gurdo ludas...  
 Sed pro tio ne konkludas  
 Ke vi, kiel trobadoro  
 Eĉ se estus vi kantoro  
 De la pap' Vi povas kanti  
 Post noktmezo, eĉ por fandi  
 Koron de la dolĉulino!  
 Pun' ja trafus vin pro l' krimo

Ho, Vi, Bonedukatulo,  
 Eĉ plej ŝerca petolulo,  
 Nur elektu laŭ deziro  
 Unu el la amturniro  
 Nigran, blondan kaj eĉ ruĝan  
 Ĉu naivan aŭ, ĉu muĝan,  
 Eĉ se estas ŝi pirata...  
 Sed ne estas tolerata  
 Kiel reĝo Salomono  
 Troni en la festsalono  
 Inter centoj da virinoj,  
 En la mez' de dancistinoj,  
 Kvazaŭ reĝo el Azio.  
 ... Jen punota fantazio!

Ho, Vi, Bonedukatulo,  
 Eĉ plej ŝerca petolulo,  
 Nur la pledon de l' rezono  
 (Ne ŝanĝebla laŭ sezono)  
 Vi bezonas; ne la kodon.  
 Ĉiu konas ja la modon  
 De la bona edukado.  
 Ĉu ne jam ĉi tiu plado  
 Vin sufiĉas, petolulo?  
 (Ĉar mi timas pro kalkulo!)  
 Ĉion nomi, kion bone  
 Edukata hom' lakone  
 Eĉ ne povas fari, tedus  
 Vin... Kaj certe vi oscedus!

Pol VARENS.

## La Sekreto

*de Felix Timmermans*

Netteke Verholen estis mortanta kaj la etnombra geparenaro, tri nevinoj — kiuj estis fratinoj — kaj maljuna onklo, staris ĉirkaŭ la lito. Ili klopodis ŝajni malĝojaj. La hospitalmonaĥino tenis en la mano brulantan, benitan kandelon, kaj preĝis la preĝojn de la mortantoj.

En siaj litoj, la aliaj malsanulinoj de la ĉambrego rigardis al la agonio de Netteke kaj paroletis pri tio unu kun la alia.

Si kuŝis en blanka litaĵo, griza kiel terpomo, kun grandaj bluaj palprebroj, kiuj ne tute fermiĝis kaj montris blankan fendeton de ŝiaj sekaj okuloj. Ŝia elspirado estis kiel tik-tak' o de vekhorloĝo, tiel rapida.

Tamen kio estis tio? Rigardu... Senĉese moviĝas ŝiaj blankaj lipoj. Si ankoraŭ volus diri ion, kaj ne plu povas. Sur tiu lipmoveto kuŝis iu malespero, iu peto; estis kvazaŭ la manoj volus savi ion, sed ne unu vorto eliĝis.

La geparencoj aŭskultis al la moviĝantaj, silentantaj lipoj, kaj forgesis preĝi. Ĉar ŝajnis al la tri fratinoj, (kiuj ĉiam estis sammaniere vestitaj kaj sammaniere pensis), ke tiuj lipoj portis sekreton. Kaj tiu sekreto nur povis esti, ke la mortanta nevino ie kaŝis poton da mono. Si certe volis diri al ili kie troviĝas la poton. Tion ili pensis kaj flustretis unu al la alian.

Sed la onklo pensis nenion, li staris tie, tial ke li ankaŭ estis alvokita; li ne aŭdis, estis surda kiel kanono! Ĉiufoje, ke li vidis ekmoviĝi la lipojn, li demandis al unu el la tri nevinoj, ĉar li ankaŭ estis ilia onklo: « Kion ŝi diris? » La nevino flustris lin en la orelo: « Nenion! » Sed tion ankaŭ li ne aŭdis. Tamen li ŝajnis kompreni kaj kapjesis ridetante kaj diris kontente: « Nu... nu... »; kaj post momento kiam ree la lipoj moviĝis, li redemandis: « Kion ŝi diris? ».

Per siaj pensadoj la nevinoj plektis fortan snuron, kaj ili tiris al tiu snuro per tuta forto, ĉar ĉe ĝi pendis trezoro.

Certe, kiam antaŭ unu horo ili estis alvokitaj apud la mortanta nevino, ili neeble povis pensi tion.

Ĉar Netteke estis kiel ili, simpla burĝineto (sia metio estis kudristino), kiu manĝis malmulte kaj trinkis kafon, akvosimilan, pro sia obstina stomako. Sed nun la nevinoj subite deziris, ke tiu malgrasa vivo estus sekvo de avareco, kaj ke ili povus heredi poton da oro. Ĉar kial alie tiuj lipoj moviĝus tiel malespere. La plej maljuna el la tri nevinoj, vestita kiel la aliaj per nigra manteleto kaj aro de kokplumoj sur la ĉapelo, kuraiĝis meti sian oreleon super la lipoj, por kapti la sekreton el la silento.

— Nu, diru al mi, Netteke, » parolis la nevino, « nu, diru... »

Netteke klopodis malfermi la okulojn, sed vane... kaj malrapide larmo glitis super ŝiaj malgrasaj, sulkaj tempioj. Ho! Se la nevino nur kuraĝis demandi ion pri la orpoto. Sendube ŝi havis la intencon, sed ne kuraĝis kaŭze de la monaĥino, kiu senĉese preĝadis.

— « Kion ŝi diris? » intertempe la onklo petis.

— « Nenion! »

La tri fratinoj rigardis unu la aliajn kaj pli kaj pli oni povis legi kompaton sur iliaj vizaĝoj.

Kiam Netteke ankoraŭ kudris, ili neniam lasis fari robon de ŝi.

La samen semajnon ili jam vizitis ŝin kaj alportis du oranĝojn kaj duonpaketon da ĉokolado.

Kiam ili estis for, Netteke estis dirinta al la malsanulino flanke de ŝi: « Ververe, la homoj estas strangaj. Kiam vi estas sana, ili ne priokupas pri vi, ne diras « Bonan tagon »; estas kvazaŭ ili timas ke via plafono falus sur ilia kapo. Sed kiam vi kuŝas en lito, malsana kaj nefleksebla kaj nenion vi plaĉas, ili vizitas vin alportante oranĝojn kaj ĉokoladon, ĉar ili scias ke vi ne kapablas ion pasigi tra la gorgo. »

La du oranĝoj kaj la paketo da ĉokolado ankoraŭ kuŝis sur la nokttabelo. Netteke estis rakontinta ĉi-tion al tiu malsanulino, kaj tiu ĉi rediris ĉion al la aliaj; kaj nun ĉiuj ĵaluze rigardis al la artefarita doloro de la nevinoj.

Antaŭe la nevinoj daŭre enviis. Netteke'n. Ili estis nevinoj laŭflanke de siaj ambaŭ patrinoj. Dum la juneca aĝo la nevinoj ĉiam portis malhelajn vestaĵojn kun multaj butonoj kaj portis ilin ĝis ili estis tute eluzitaj. Ĉiun superjaron ili fariĝis novan robon, de kie la ŝtofo jam estis aĉetita antaŭ pliaj jaroj. Siaflanke, Netteke, ĉiam estis, sekve de sia metio, vestita laŭ la modo, zorge kaj elegante.

Si estis koketa per la plej simpla. Jaluze la nevinoj nomis ŝin : « La modjurnaleto ». Netteke nomis la triopon, kiam dimanĉe ŝi vidis ilin, promenante unu flanke de la aliaj, vestitaj per malnovaj roboj ; « La landjuvelo » (1).

La tri fratinoj, kiuj ĉiam pensis same, decidis ne edziniĝi. Estis facile, ĉar la konvena fraŭlo neniam alvenis. Ho ! Ili preskaŭ eksplodis pro ĵaluzo, kiam Netteke havis amanton. Sed kiam je l' momento de la geedziĝo, la knabo forlasis ŝin (neniu sciis la kaŭzon), la nevinoj plezure trinkis tason da forta kafo.

Tio estis ega malfeliĉo en la vivo de Netteke. Si malgrasiĝis kiel fiŝosto, sed restis egale modama. Si tamen restis kuraĝa kaj tenadis guston por kudri kaj porti belajn vestaĵojn.

Multajn jarojn ŝi ankoraŭ restis freŝa kaj aminda, sed tiam okazis la stomakdoloro, tiu eterna turmenta doloro, kiu de tag' al tago pli malboniĝis kaj ne kvietiĝis spite ĉiujn rimedojn, kiuj estas troveblaj en la gazetoj.

Si flaviĝis, obtenis putojn en la vangoj, manĝis malmulte, ne plu kuraĝis manĝi, sekvis ĉiujn reĝimojn. Ĉiu kliento alportis novan. Sed ne malaperis la doloro, kaj ŝi devis laboregi.

Tamen neniam, kvankam la stomakdoloro formanĝis ŝian belecon kaj ŝian monon, ŝi forgesis meti frizilojn en la hararo. Jam kokete vestita ŝi malsuprenvenis matene, kaj kiam ŝi iris dormi, ŝi estis egale zorgema kaj pura. Ne unu momenton io malespera montriĝis je ŝia bongusta vestmaniero.

La doloroj pinĉis pli akre: Foje ŝi ne povis plu labori, klientoj forrestis, dum tagoj ŝi luliĝis sur seĝo pro la doloro. Sed ŝia vestaĵo estis en bona ordo kaj ŝia brila haro ĉiam bele restis frizita.

Malrapide la « cendoj » estis elspezitaj. Kune kun la plimalakriĝo de la doloro alvenis ankaŭ la mizero. Si maljuniĝis tro laŭ sia aĝo, iĝis flavkolora, sulkigita, malhela. Kiam ŝi estis kvardekkvinjara, ĉiu estus dirinta : ŝi estas sesdekjara.

Finfine ŝi devis al hospitalo por operacio ; la kuracistoj fortranĉis abcesojn de ŝia stomako, sed post dek semajnoj ŝi ankoraŭ kuŝis en la malsanulejo, nekonebla, griza kaj kaduka. Malgraŭ ĉio ŝi altentenis la kuraĝon kaj rifuzis la maljunulina noktkufon, kaj restis en la lito kun bele kombitaj haroj kaj prizorgitaj ungoj.

La dimanĉon, post la operacio, vizitis ŝin la nevinoj, ĉar la pastro de l'hospitalo venis rakonti al ili pri la graveco de la malsano. Kaj kiam post dek semajnoj ŝi ne jam estis morta, ili kunportis du oranĝojn kaj paketon da ĉokolado. Kaj tiun ĉi matenen oni tuj alvokis ilin, ĉar ilia nevineto Netteke liberigas sian animon.

---

(1) Nederlandlingve: « Het Landjuweel » — Tio estas historia sekvantaro, kiu de temp' al tempo okazas en Antverpeno.

Dum ili rigardis ĉagrene, ili gojis ĉar ili estis brilaj, rozkoloraj kaj sensulkaj, dume Netteke kuŝis tie terure griza kaj malbelega, kaj sensacie ili atendis la sekreton, kiun la lipoj ne kapablis plu ellasi. Intertempe la onklo ne forgesis demandi : « Kion ŝi diris ? »

Kaj dum la monaĥino murmuris la lastajn frazojn de la pregoj, dum la onklo ridetis kvazaŭ li komprenis ĉion, kaj la nevinoj per ĉiuj siaj deziroj atendas la sekreton de la silentaj lipoj, subite envenis viro kun fotografilo. Monaĥino antaŭiris lin. « Ĉi tie », ŝi parolis. Kun la viro ŝi alproksimiĝas la mortliton, kaj flustris mallonge kaj senkulpigante al la parencaro. « Iom da spaco, mi petas. Tio servos por la sinjoro Doktoro, por sia kolekto de mortantaj homoj ».

La fotografisto metis la aparaton antaŭ la vizaĝo de Netteke. Subite la mortantino tre tremadis, kaj per supera volforto ŝi malfermegis la okulojn, la blankaj lipoj tremetis, kaj malespere la seka, maldika gorĝo puŝis eksteren : « Fratino... ne... ne, ne fotografi tiamaniere... Mi sciis ke li devis alveni, mi ne plu kapablis diri ĝin... Ĉar mia hararo estas malorda, kombu foje miajn harojn, tiam denove estas bukletoj... Rapide... Jesuo... Mario... Ve...

Kaj la griza kapo falis malrigide, kaj ŝi estis morta.

— « Tro malfrue », diris la fotografisto. « Fratino, ĉu eble ankaŭ alia estas mortanta ? »

La tri nevinoj rigardis unu la aliajn seniluziigite, sin sentis insultitaj, kaj subite la plej maljuna prenis la paketon de ĉokolado sub sia nigra manteleto.

— « Kion ŝi diris », demandis la onklo.

— « Nenion ! »

— « Nu, nu... », li ridetis.

Tradukis : Pol VARENS.

P. S. — Felix Timmermans estas nuntempa fama flandra romanverkisto, kies ĉefa verko « Pallieter » ankaŭ estas esperantigita.

## Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

Ni avertas la legantojn kiuj deziras ankoraŭ akiri la kongreskanton, ke restas nur 10 ekzempleroj.

La prezo estas, afrankite, 3 fr. Mendu ĝin senprokraste al Flandra Esperanto-Instituto.

— **TURISMO** estas rigardata grave ankaŭ en Japanujo en la lastaj jaroj pro akcela plimultiĝo de fremdlandaj turistoj al Japanujo, kaj Esperanto certe ĝuas favoran akcepton inter la Japanaj aŭtoritatoj.

Tio estas konstatebla laŭ la tre bela gvidlibro eldonita de la Fervoja Ministrejo. Per tiu broŝuro vi povas akiri konon pri ĉio kio povas esti interesa kaj utila por turistoj.

La libro, titolita « Japanujo », estas senpage havebla ĉe adreso : Direkcio por Turismo (Kokusai Kankoo-Kjoku) en Japana Fervoja Ministrejo. Tokio.

LA PLEJ GRANDIOZA VERKO DE NIA LITERATURO : ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO. ambaŭ volumoj estas fine pretaj. En la redakto de L. KOKENY kaj V. BLEIER, ĝi ampleksas sur siag grandformataj 900 PAGOJ, kies triono estas ilustraĵoj, la tutan historion de nia movado, kun ĉiuj ĝiaj detaloj, per densa komposto. *Memalhavebla libro por ĉiu serioza Esperantisto.*

Prezo de ambaŭ volumoj, sv. fr. bind. : 34,— ; broŝ. : 30,— ; sen ilustraĵoj, sv. fr., bind. : 20,— ; broŝ. : 18,—, plus 10 % por send-kostoj.

AELA — serio 1933, kun anbaŭ volumoj de Enciklopedio kostas por novaj AELA-anoj sv. fr. : 33,50 afrankite kun kvar aliaj volumoj.

Por AELA-anoj 40 %-a rabato.

Grandaj prezofavoroj por jenaj landoj : Bulgarujo, Aŭstrio, Danujo, Estonujo, Hispanujo, Jugoslavio, Japanujo, Ĉeĥoslovakujo, Svedujo, Britlando kaj Dominioj, usono Sudamerikaj Statoj.

Detalan prospekton sendas al vi : Aktivularo de Esperantistaj Libro-Amikoj (Literatura Mondo Budapeŝt) IX, Mester-u, 53 — Hungarujo — ĝiaj reprezentantoj kaj ĉiuj E-libristoj.

## Nekrologo

La 20-an de aŭgusto mortis en Marke, S-ano Pierre Casier, 71 jara, estrarano de la grupo Kortrijk, membro de Flandra Esperanto-Instituto kaj delegito de UEA ; li estis la plej maljuna membro de FLE kaj fervora adepto de Esperanto.

S-ro Casier estis modelo por la junaj esperantistoj ; nek pluvo, nek frostoj, nek neĝo povis lin deteni piediri 6 kilometrojn ĝis Kortrijk, por ĉeesti ĉiusemajne la grupajn kunvenojn, kie li neniam mankis.

Delegacio el Kortrijk ĉeestis la entombigon kaj metis florkronon.

## Gratuloj

EDZIGO : Niajn korajn bondezirojn al S-ro D-ro Ponette kaj F.ino Termonia, ambaŭ membroj de nia grupo. La Paca Stelo precipe deziras ke ili iĝu aktivaj kunhelpantoj de nia nobla afero de Esperanto.

HONORIGO : Gojokrioj iras al nia paca stelano S-ro Spiers Marc, kiu obtenis arĝentan honorprezon, okaze de sia Laŭreateco de la laboro (Tekstilo) en Bruselo, en la mondekspozicio. Marco, ni fieras je vi ! Gratulojn !

## Grupa Vivo

AALST. — « PIONIRO ».

La grupo regule kunvenas ĉiumerkrede. La 10an de aŭgusto S-ro Lepp, Doktoro en filologiaj kaj filozofiaj sciencoj, faris interesan paroladon en la festsalono de la urbdomo pri « Vivo kaj moroj en Estonio ».



Nia bibliotekistino, F.ino De Vuyst, reordigis nian bibliotekon, faris inventarion de la libroj kaj prezentis raporton al la grupo. F.ino Palmyre De Cock, sekretariino, raportis pri sia vojaĝo en Nederlando kaj detale priskribis sian restadon en la Esperanto-domo en Arnhem. Ni organizos kelkajn kantvesperojn sub la gvidado de F.ino Laura Vereecken ; la membroj estas petataj regule kunporti la kantlibron.

#### ANTWERPEN : FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Kelkaj grupanoj aliĝis, kiel gastoj, al la 2a I. P. E. kongreso, kiu okazis en nia urbo de la 9a ĝis la 14a de aŭgusto. Scivoleme ili ĉeestis la sabatan interkonatiĝkunvenon, kie ili esperis renkonti Henri Barbusse, kiu prezidus. Lasthore li telegrame senkulpigis sin, estante en Rusujo. Nun ili ne plu havos la okazon vidi la faman verkiston vivanta. Henri Barbusse estas morta.

Merkrede, aro da I. P. E. kongresistoj nin vizitis en nia ejo dum la semajna kunveno, kiu per tiu surpriza vizito tuj aliĝis en internacia kunveno. Ĉar 8 diversaj nacioj estis reprezentataj, ĝi iom similis kunsidon de la ligo de nacioj, kun tiu diferenco... ke oni komprenis unu la alian.

Je invito de F.ino I. Dirixks, kiu estas tre favora al Esperanto, ni, la 10an de aŭgusto faris biciklan ekskurson al Diest, kie ni agrable pasigis la tagon. Post alveno tie, ni komencis per naĝi en la « duona luno » ; ni finis per ĉeesto de loka kirmeso, kaj inter la komenco kaj fino ni manĝis rizkaĉon kaj pruntorton. Kion vi deziras ankoraŭ pli, mia karulino ?

La 8an de sept. kontraŭvizitis nin en Antverpeno, la Breda'a Grupo de « Nederlanda Katoliko ». Matene, okazis kunveno. Post salutvortoj ambaŭflanke, ni, pere de parolado ebligis al niaj Nederlandaj gesamideanoj iom konatiĝi kun la Flandra movado.

Posttagmeze ni faris promenadon tra la urbo por montri al ili la vidindaĵojn.

Antaŭ nelonge, la grupo aranĝis inter la gemembroj, konkurson por akiri propran grupkanton. Sen kantoj estis ensendataj, el kiuj ni elektis la plej bonan. La tekston, ni do jam havas. Nur la muziko ankoraŭ mankas.

#### MECHELEN. -- LA ESTONTO.

Post la feriaj tagoj ni denove regule kunvenas en la hejmo de nia prezidanto. Ni instigas la membrojn bone kaj multnombre ĉeesti tiujn vesperojn, kiuj ja iĝas pli interesaj, despli diverse kaj grand-skale ni povas labori.

Pliaj el niaj membroj vojaĝis tiun ĉi someron kaj dum tutaj vesperoj povas rakonti al ni pri la interesaĵoj kiujn ili renkontis, pri la spirito kaj la moroj, pri eksterlandaj samideanoj, k. t. p.

ATENTU ! Ankaŭ la unua kunveno de la monato okazas nun Hombeeksche steenweg, 54, ĉar la ejo de la urba popolbiblioteko ne estas plu je nia dispono, sekve de la diversaj ŝanĝoj en la urbaj instruadaferoj.

Nia grupo bonege laboras ĉar ĉiun semajnon senescepte ni kunvenas por pliperfektigi nin en la lingvo Zamenhofa. Oni kantas, tradukas, pritraktas diversajn punktojn k. t. p.

Le ekskursoj estas finitaj, domaĝe ĉar la plej granda nombro tre bedaŭras precipe ke ili ĉiuj ege bone sukcesis rilate la partoprenantaro kaj ankaŭ laŭ la propaganda vidpunkto.

Tiun-ĉi monaton la metodo estos pridiskutata por atingi seriozan nombron da novaj elementoj por niaj novaj kursoj vintraj.

Oni ankaŭ tre serioze pritraktis dum estrarkunveno la diversajn manierojn por estonta influhava propagando. Le estraro esperas de siaj membroj ke ĉiuj kunhelpos al tiu malfacila laboro.

La grupo aĉetis aparaton por obteni multobligitajn programojn kiuj, kiel antaŭe, estos dissendataj al ĉiu membro de nia grupo.

Je okazo de la Zamenhofa tago, oni decidis alaĉeti kelkajn bonajn kaj belajn librojn por pliriĉigi nian grupan bibliotekon.

Ronsaj Gesamideanoj ! De vi absolute dependos nia sukceso por la lokaj esperantaj sukcesoj. Do, de nun al konstanta laboro.

**KORTRIJK.** — Merkredo, 2-an de oktobro, monata kunveno en la kutima ejo. La membroj estas petataj alporti sian ekzempleron de « Flandra Esperantisto », por komuna legado kaj ekzerco.

Nova kurso okazos komence de novembro.

## Lastaj Komunikoj

La 22an de septembro okazis en Antwerpen la Liga kunveno. La raporto aperos en la sekvonta numero. La ĉefaj decidoj estas :

S.ro Rainson iĝas Prezidanto de la Ligo. Oni fondis studo-komitaton por pristudi la eventualan aliĝon al Tutnederlanda Esperanto Ligo. Gent estos la loko de nia 7a kongreso. La bilanco de la Brusela kongreso estas aprobata. Ekde januaro venonta la « Flandrema Grupo Esperantista » estas redaktoro de « Flandra Esperantisto ».

La sekvonta kunveno de F. L. E. okazos en Gent, la 8an de decembro.

Posttagmeze okazis la inaŭguro de la tomboŝtono sur la tombo de Juul Karnas. Ĉeestis multaj personoj krom la vidvino, la fileto kaj la parenkaro, inter alie, S.roj J. Jacobs de A. P. P. K., M. Jaumotte, Direktoro de « Belga Esperantisto », M. de Ketelaere, ĉefdelegito de U. E. A.

Unuanime oni konsentis, ke la tomboŝtono estas monumento, inda al la mortinto kaj al Esperanto. Post la inaŭguro la tombon oni ornamis per multaj belaj florbukedoj. Paroladis S.ro Lodema, en la nomo de la Komitato, kaj S.ro Rainson nome de F. L. E. La patro de la mortinto dankis.

Pli detala raporto, eble kun foto de la tombo oni trovos en la sekvonta numero.

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.  
**Ondervoorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.  
**Postcheck:** Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap** (met maandblad): 20 fr. per jaar.

### **Aangesloten groepen:**

**Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Aarschot:** « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.  
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.  
**Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.  
**Srussei:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.  
**Edegem:** « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.  
**Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Lede:** « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.  
**Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.  
**Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.  
**Mechelen:** « La Estonto », vergadering elke Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.  
**Nieuwpoort:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.  
**Oostende:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.  
**Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.  
**Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.  
**St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

### **Alle inlichtingen verstrekken verder te:**

**Diksmuide:** M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.  
**Gent:** Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stacegemstraat.  
**Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.  
**Maria-Hoorebeke:** Gerard Broodcoorens, Dorp.  
**Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.  
**Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.  
**Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

---

---

OSTENDO

---

# HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

---

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

5-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

---

---

## Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

---

*Kien, dum Pentekosto 1936 ?*

Al Gent, al la 7a Kongreso de la  
Flandraj Esperantistoj !

---

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.